

Nikolaus Lenau,

## Aŭtuno

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mutiĝo kaj senkoloriĝo:  
La vento flate min tuŝetas,  
foliojn arboj nun demetas;  
min ravas tiu formortiĝo.

Foriĝas de ĉi tie ĉio,  
la amon oni jam forgesis,  
la birdoj longe kanti ĉesis,  
mallaŭte sinkas la folio.

La birdoj estas forflugintaj,  
iliaj nestoj videbliĝas,  
folioj lacaj subeniĝas  
de branĉoj senfoliĝintaj.

En la arbara susurado  
alblovas min sciigo iu,  
ke estas formortiĝo ĉiu  
sekreta, gaja nur ŝanĝado.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de NIKOLAUS LENAŬ (\*1802-08.13 - †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-628-1270 (2012-10-26 14:31:44)*